

Mizera stato de la Homaj Rajtoj en multaj landoj je la 10a de decembro 2018:

Plej granda krizo de la Homaj Rajtoj post 1945

70-a datreveno de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj

Prezidento Steinmeier varbis por la respektado de la homaj rajtoj en Ĉinio

Laŭ la internacie renoma homrajta advokato Manfred Nowak, homaj rajtoj estas nuntempe minacataj kiel ne-niam antaŭe ekde 1945. „Ni estas en la plej profunda krizo de la homaj rajtoj, demokratio kaj jura ŝtateco depost la fino de la Dua Mondmilito,“ diris la scienca direktoro de la Ludwig Boltzmann Instituto por Homaj Rajtoj en Vieno,¹ kiu pli frue estis speciala raportisto de UN pri torturo.

Homaj rajtoj estis lezataj ankaŭ en la pasintaj jardekoj, sed nun ili estas pridubataj parte en sia fundamento,“ la sperta fakulo lamentis sojle de la 70-a datreveno de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj la 10an de decembro 2018.

Responde al la doloraj spertoj de du mondmilitoj, la severa ekonomia krizo en la 1930-aj jaroj kaj la leviĝo de la faŝismo ĝis la holokaŭsto post 1945 estis fonditaj organizaĵoj kiel la Unuiĝintaj Nacioj, la Eŭropa Unio, la Eŭropa Konsilio kaj multaj aliaj institucioj, la homrajta eksperto rememorigis. „La liberigo de la milito kaj perforto kaj la liberigo de la manko kaj malriĉeco surbaze de la digno kaj de la homaj rajtoj estas la esencaj celoj de Unuiĝintaj Nacioj, sed ankaŭ de aliaj organizaĵoj“, Nowak diris.

Nuntempe, ĉi tiu fundamenta konsento pri homaj rajtoj estas pridubata. Ekzistas demandoj kiel ekzemple „Ĉu ni vere bezonas homajn rajtojn?“, „Ĉu aŭtoritataj ŝtatoj kaj malliberalaj demokratioj ne estas pli bonaj ol liberalaj demokratioj?“ aŭ „Ĉu ni ankoraŭ bezonas la juran ŝtaton,“² precipe kiam temas pri rifuĝintoj kaj migrantoj“, Nowak diris en konversacio kun *Vatikanaj Novaĵoj*.

Laŭ Nowak estas grave kaj esence „planti la ideojn kaj celojn de la homaj rajtoj kaj de la demokratio en la cerbojn, sed ankaŭ en la korojn de la homoj.“ Nowak postulis „kampanjon de la homrajta edukado“, kiu devas komenciĝi jam en la infanĝardeno, kie oni devas klarigi al la infanoj, ke la homaj rajtoj estas „la bazo por paca kaj prospera socio“ kaj ke por valoroj kiel paco, toleremo, homaj rajtoj kaj demokratio „indas vivi.“

Nowak vidas multajn kaŭzojn por la nuna krizo de la homaj rajtoj. Laŭ li, post la fino de la komunismo en orienta Eŭropo fine de la 1980-aj kaj komence de la 1990-aj jaroj la homaro maltrafis la ŝancon por krei tutmondan ordon konforme al la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj la UN-Ĉarto. „Ĉi tiu historia ŝanco estis maltrafita, ĉar super la komunismo, totalismo kaj diktaturo ne venkis unuavice la demokratio kaj homaj rajtoj, sed fakte nur la kapitalismo. Tio estis tro mallarĝa.“

En la poste kreitaj „novliberala mondordo“ kaj sistemo de la „tutmondiĝo“ la aŭstra homrajta advokato vidas la ĉefajn kialojn por la abismo inter riĉeco kaj malriĉeco, kiel ĝi ekzistis antaŭ la Unua Mondmilito. Nun ĝi atingis denove gigantan dimension. Tio subfosas la socian konvencion inter la homoj kaj malfortigas la pilierojn de la demokratio. Ĝi ankaŭ kondukas al socia malkonstruo kaj al fiaskintaj ŝtatoj, kiuj ne kapablas garantii la homajn rajtojn.

Per tio ekestis vakuo, kiun plenigas la organizata krimo kaj la komercado per drogoj kaj armiloj. Tiu vakuo sekvigas ankaŭ terorismon kaj armitajn konfliktojn, kiel Nowak emfazis. „Nuntempe ni havas pli da konfliktoj ol iam ajn ekde la fino de la Dua Mondmilito. Kvankam ekzistas malpli da internaciaj militoj, ni registras tre multajn lokajn civilajn konfliktojn, kiuj estas karakterizataj de nekredebla krueleco.“

La „turbo-kapitalismo“ eĉ havas sekvojn por la ŝanĝiĝo de la klimato, Nowak plue avertis. Kaj tio sialavice estas unu el la kaŭzoj por la malriĉeco kaj „ke la homoj ne plu povas nutri sin kaj siajn familiojn kaj tial estas devigataj forlasi sian patrujon.“ „Ekzistas nun pli da rifuĝintoj ol iam ajn depost 1945. 65

¹ Vd. <https://bim.lbg.ac.at>.

² Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Jurŝtato> (la germana, franca aŭ angla versioj estas pli detalaj).

milionoj da homoj estis forpelitaj de siaj hejmaj loĝlokoj. Multaj el ili nun devas vivi en najbaraj landoj, kie ili ne estas bonvenaj“, Nowak konkludis.³

Ankaŭ Amnestio Internacia observas en la lastaj jaroj evoluon, kiu pridubas aŭ relativigas internaciajn homrajtajn normojn, kiel atentigas la ĝenerala sekretario de Amnestio Internacia en Germanio, Markus Beeko. Al landoj kiel Ruslando kaj Turkio, sed ankaŭ Usono li riproĉis „atakon kontraŭ la homaj rajtoj“. La usona prezidento Trump pridubas la malpermeson de la turmentado kaj ordonis separi ĉe la limo al Meksiko centojn da infanoj de iliaj familioj. Ruslando kaj Turkio pridubis la Eŭropan Konvencion pri Homaj Rajtoj aŭ eĉ parte eksvalidigis ĝin. Laŭ Beeko temas pri „konsciaj lezoj de la homaj rajtoj por ataki la internacian konvencion pri la protektado de la homaj rajtoj en la internacia kadro“.⁴

Se oni legas la ĉiujaran raporton de Amnestio Internacia kaj aliaj homrajtaj organizaĵoj, oni konstatas, ke la homaj rajtoj estas lezataj en diversaj formoj kaj manieroj en preskaŭ ĉiu lando de la mondo.⁵

Prezidento Steinmeier varbas por la homaj rajtoj en Ĉinio

Ĉinio pridubas en multaj rilatoj la universalecon de la homaj rajtoj kaj propagandas propran „koncepton“. Tamen, Frank-Walter Steinmeier, prezidento de Germana Federacia Respubliko, ne volis resti indiferenta al tiu sinteno dum sia decembra vojaĝo tra Ĉinio. Sojle de la sepdekjariĝo de la proklamo de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, la germana ŝtatestro insistis pri ilia respektado en Ĉinio. „Mi forte konsilas, ke ni ne malfortigu kion ni interkonsentis nek rezignu pri ĝi“, li diris en sia parolado en la universitato de Siĉuan en Ĉengdu. La ĉinaj ŝtatestroj pridubas la universalecon de la homaj rajtoj, propagandante propran relativisman aliron al la homaj rajtoj, kiuj devas esti adaptitaj al la apartaj kondiĉoj de iu lando, kiel ili kredas. Steinmeier rememorigis la ĉinan publikon, ke inter la ŝtatoj de la mondo ankaŭ Ĉinio subskribis la Universalan Deklaracion de la Homaj Rajtoj en la 10a de decembro 1948. „Tio estis feliĉa kazo de la historio“, li emfazis. Rigarde al la kreskanta komplekseco de la mondo „tiu komuna fundamento fariĝis ege necesa“, ankaŭ ĉar li timas, ke nuntempe oni ne plu sukcesus verki tian tekston“.⁶

Konsiderante la internacian kritikon pri la „re-edukaj centroj“ en la regiono Xinjiang, kiuj antaŭ ne longe estis malkovritaj de homrajtaj aktivuloj kaj en kiuj estas internigitaj takseble ĝis unu miliono da homoj precipe kun islama religio,⁷ la ĉina propagando lastatempe misprezentis la homajn rajtojn kiel okci-dentan inventaĵon kaj nebuligis la nocion de la homaj rajtoj, kio estis kritikata eĉ en diversaj rezoluci-proponoj de UN. En pluraj kazoj, kie ĉinaj civitanoj kunpuŝiĝis kun okcidentaj leĝoj, Pekino parolis pri lezado de la homaj rajtoj de ĉinaj civitanoj, plej aktuale en la kazo de la ĉefo pri financoj de la ĉina telekomunika firmao Huawei en Kanado. La situacio de la homaj rajtoj en Ĉinio draste malboniĝis, kiel montras ne nur la ekzemploj de Xinjiang kaj Tibeto,⁸ kiuj troviĝas sub ĉina okupacio, sed ankaŭ la traktado de Hongkongo kaj la tuta kruda observado kaj kontrolado de la ĉina civila socio fare de la ĉiopotenca komunisma partio kaj ĝiaj sekurecaj servoj kaj reprezaliaj organoj.

³ (Laŭ <https://www.tt.com/ticker/15100223/voelkerrechtler-nowak-menschenrechte-in-tiefster-krise-seit-1945>). Pri Manfred Nowak vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Manfred_Nowak.

⁴ Vd. <https://www.merkur.de/politik/amnesty-international-sieht-angriff-auf-menschenrechte-zr-10830804.html>.

⁵ Vd. http://www.planlingvoj.ch/Homajrajtoj_2016.pdf, http://www.planlingvoj.ch/Homaj_rajtoj_2014-15.pdf.

⁶ Vd. <https://www.faz.net/aktuell/politik/supermacht-china/frank-walter-steinmeier-wirbt-in-china-fuer-menschenrechte-15929063.html>.

⁷ Vd. <https://www.tagesanzeiger.ch/ausland/asien-und-ozeanien/Die-Umerziehungslager-kehren-zurueck/story/24136330>, <https://www.tagesspiegel.de/politik/un-bericht-zu-muslimen-millionen-uiguren-sollen-in-china-interniert-sein/22904608.html>, <https://derstandard.at/2000089117679/China-erlaubt-Umerziehungslager-fuer-Muslime-in-Xinjiang-per-Gesetz>, <https://www.srf.ch/news/international/muslim-minderheit-in-china-china-legalisiert-umerziehungslager-fuer-uiguren>, <https://www.srf.ch/news/international/umerziehung-auf-chinesisch-alles-im-namen-der-terrorbekaempfung>, <https://www.zeit.de/politik/ausland/2018-08/vereinte-nationen-uiguren-internierung-china-reaktion>, <https://www.sueddeutsche.de/politik/xinjiang-china-verschaerft-repressionen-gegen-muslime-1.3447784>, <https://www.zdf.de/politik/auslandsjournal/die-sendung-vom-14-november-2018-100.html>, <https://de.wikipedia.org/wiki/Xinjiang>.

⁸ Vd. <https://www.hrw.org/world-report/2018/country-chapters/china-and-tibet>,

Esperanto-movado kaj homaj rajtoj

La Esperanto-movado daŭre rilatas sen esenca kritiko al ŝtatoj kiel Ĉinio, Irano kaj Kubo, kie la homaj rajtoj estas plej draste lezataj. Pro „politika neŭtraleco“ la oficiala Esperanto-movado neniam kritikis la lezadon de la homaj rajtoj en tiuj landoj, ĉar ĝi timis, ke en tia kazo la registaroj de tiuj ŝtatoj povus subpremi kaj persekuti la esperantistojn kaj rezigni pri la enkonduko de Esperanto en siajn lernejojn. Dum la komunisma erao la Esperanto-movado ĝojis pri la (dubinda) subteno de Esperanto flanke de la ko-munismaj reĝimoj en orienta Eŭropo kaj tiel fariĝis komplico de tiuj reĝimoj, kies politikon rilate al la homaj rajtoj ĝi ne kuraĝis kritiki, ĉar de la lezado de la homaj rajtoj en tiuj landoj la Esperanto-mova-do evidente ne sentis sin koncernata. Estas klare, ke per tiu sinteno la Esperanto-movado politike kom-promitiĝis kaj kondukis sian laŭdiran respekton al la homaj rajtoj, kiujn ĝi formale subtenas pere de la statutoj de la Esperanto-organizaĵoj, al la absurdo. Ankaŭ en la Esperanto-movado ekzistas individuoj, kiuj kredas, ke la homaj rajtoj estas nura okcidenta inventaĵo kaj same dubas pri ilia neceso, utilo aŭ ekzistorajto.⁹

Ĉar la esperanta eldono de la *Unesko-Kuriero*, kiu estas tradukaĵo de la nacilingvaj eldonoj, estas financata kaj gvidata de ĉinoj,¹⁰ oni probable ne povas atendi, ke la „aplikado“ de la homaj rajtoj fare de Ĉinio povas esti kritike traktata en tiu revuo, ĉar la ĉina registaro verŝajne tuj malpermesus tiun gazeton en Ĉinio kaj ĉesigus la apogon al la Esperanto-projekto.

Publikigita de www.planlingvoj.ch, decembro 2018.

⁹ Vd. http://www.planlingvoj.ch/Esperanto_movado_kaj_homaj_rajtoj.pdf.

¹⁰ Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Unesko-Kuriero>,
<http://esperanto.cri.cn/2521/2017/10/11/262s195333.htm?from=singlemessage>,
https://eo.wikipedia.org/wiki/Trezoro_Huang_Yinbao